

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri Edmond Privat, mondialisto kaj esperantista verkisto. Vi aŭdas la 3-an prelegon pri tiu ĉi temo per citaĵoj el lia verko *Interpopola Konduto*.

Edmond Privat enkondukas sian libron *Interpopola Konduto* per la konstato, ke *Azio kaj Afriko pruntas el Okcidento ties ĉefan kredon. Ne kristanismo ĝi estas, sed naciismo. Tiu kredo rigardas la ŝtaton kvazaŭ korpon kaj la patrujon kvazaŭ animon. Oni povas imagi la unu sen l'alía. Trudita kreaĵo politika, kiel nuntempe Unuiĝinta Naciaro, jen korpo sen animo. Premata nacio, kiel nuntempe Angolo, jen animo sen korpo.*

*Se venas milito, ni devas al la patrujo mem oferi nian vivon. Laŭ tiu mezurilo ni komprenas, ke la patrujamo estas la ĉefa religio ĉirkaŭ ni.*

*Nacian konscion oni kulturas en lernejo, en preĝejo, en la hejmo, en la gazetaro, en armeo. Per ĝi la homo super si mem altiĝas. Per ĝi li partoprenas en estaĵo multobla kaj dia.*

*Naskiĝa tero fariĝas templo, gepatra lingvo kvazaŭ komunio, nacia flago kvazaŭ sanktejo, ŝtata himno kvazaŭ preĝo kaj milito ofero sur altaro.*

Post tiuj tre medigitaj konstatoj Edmond Privat ekzamenas, kion fakte faras la homoj el sia dio nacia.

Li konstatas, ke *ĉe ĉiu gento moraleco rilatas nur al la interno de la gento. Ni prenu la spionadon kiel ekzemplon : Ĉu ĝi estas krimo ? Sendube, se iu venas el ekstero por promenadi ĉirkaŭ niaj armilejoj kaj fotografadi, ĝi estas hontiga. Sed, se ni sendas iun fari tion ĉe l' najbaro, ĝi estas heroo.*

Edmond Privat poste atentigas, ke *individuo ja povas agi maljuste kaj poste rekonigi tion, sed patrujo konas nenian malbonon, krom la suferata. Ĝi ne povas esti malprava, eĉ ne venkita. Ĝi vere okupas lokon de dio. Ĝi estas maksimumo al si mem sufiĉanta. La tuta moralo estas servi la patrujon kun amo. Ofero al la patrujo estas nobla devo. Sed ofero de la patrujo al ceteraj estas ne imagebla. Juĝo pri la patrujo estas blasfemo kaj povas esti punata kiel ŝtatperfido.*

*Kie kuŝas logiko, racio, inteligento en ĉio ĉi, sin demandas Edmond Privat ? Kaj li respondas : Nenie. Estos kruda superstiĉo aŭ naŭza kruelaĵo por homoj el la venontaj jarcentoj, sed por ni ĝi estas vero nediskutebla.*

*Ĉe rivaleco inter grupoj, la ĉefa oferato estas ĉiam la vero. En lernejo ni lernis la veron sub la nomo Nacia historio. Sed fakte tiu nacia historio ne povas esti, nur historio de la nacio povas ekzisti. Sed ne estas tio, kion oni instruas. Oni instruas historion vidatan de la nacio. En multaj lernejoj tiu historio ne ankoraŭ estas scienco, sed nur literaturaĵo ĉefe primilita, kie bataloj okupas la plej grandan rolon.*

Edmond Privat daŭrigante sian analizon konstatas, ke *kio estas krimo por la homo, tio fariĝas subite devo por la regnanto. Jen strangaj ecoj de la milito. Li tiam komparas la patriotismon al la antikvaj religioj, kiuj konis la homajn oferojn. Unuatempe la sento pri teruro kunhelpis al ilia prestiĝo. Pliposte ĝi sin turnis kontraŭ ilin pro morala evoluo kaj influo de la instruoj de Budho kaj de Kristo.*

*Simile, en Okcidento, abomeno al milito sin turnas hodiaŭ kontraŭ la prinacia religio. Patriotismo devos rezigni la militojn, se ĝi ne volos vidi sin anstataŭata de alia mistiko.*

*Fakte la moralo de la milito nutriĝas el la malvirtoj de l' nuntempo kaj el la virtoj de l' estinteco.*

*Por ke la blinda nacia fervoro trovu haltigan bremson sur la vojo al katastrofo, necesus ia interŝtata moralo. Unuvorte, necesus kuna tegmento super la naciaj plafonoj.*

*Ĝis nun la naciaj aroj kutimiĝis inter si konduti kiel inter si kondutas uloj sen ia ajn moraleco.*

Edmond Privat mencias, ke la kristanaj eklezioj en la ŝtato cedis lokon al la prinacia religio. Se ribelus la eklezioj kontraŭ tia subigo, se ili ekjuĝus la nacian moralon de la ŝtato en la nomo de alia principo tutmonda, ili estus forigotaj de la publika vivo kaj persekutataj en sia instruado. Ilia edukado de l' animoj kaj de la karakteroj preparas individuajn virtojn, kiuj poste servas kolektivajn malvirtojn anstataŭ ilin korekti. Estas vera tragedio. Edmond Privat rememorigas, ke estas el la popolamasoj, ke kreskis iom post iom ĉiuj novaj religiaj sentoj. Kristanismo, patrujamo estis popolaj sentoj, kiujn poste estroj leĝigis por povi pli bone estri la popolojn. Hodiaŭ la estroj fabrikas la popolan opinion per la gazetaro, radio [kaj televido]. Sed malgraŭ tio iom post iom nova sento ekformiĝas el la sopiroj sur la tuta Tero al justeco kaj idealo. Tiu nova mistiko komprenis, ke ne nur la celoj valoras, sed ke la rimedoj por ilin atingi ankaŭ havas influon. Pro tio ĝi emas neperforton. En Unuiĝinta Naciaro renkontiĝas du moraloj interbate. Internacia estas la celo, sed naciaj la ordonoj de la registaroj al la delegitoj. Tial societo kiel Unuiĝinta Naciaro ne povas daŭri, ĉar ĝi baziĝas sur malfido. Malfido estas detruilo por ĉiu societo.

Sed Edmond Privat restas tamen optimisma, li observas, ke tamen trankvile konstruiĝas per akiritaj kutimoj iom post iom nova strukturo kaj organizo en la mondo, kiu kondukas al mondialismo. Sed sen vera mondregistaro, sen monda parlamentejo, sen monda polico kaj kontrolata malarmado, sen monda tribunalo, kies decidoj estos obeataj kaj kontrolataj, milito inter nacioj konstante renaskiĝos.

Al Unuiĝinta Naciaro mankas ia mistiko, ia propra patriotismo, ia kredo, ia lingvo, ia religio aŭ adoro por subteni ĝian moralon. UN havas nur ĉarton. Tio estas tro seka, li konkludas, kaj tiam li turnas siajn rigardojn al esperanto dirante: *Se oni ekzamenas esperanton, oni kontraŭe rimarkas tion, kio elstaras: tio estas la mistiko, kiun ĝi disvastigas ĉe siaj uzantoj.*

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond. La venontan semajnon ni daŭrigos nian prezenton de la penso de Edmond Privat, mondialisto kaj esperantista verkisto. Ni legos lian priskribon de la mistiko, kiun esperanto disvastigas ĉe siaj uzantoj, kiu mankas al Unuiĝinta Naciaro.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-